Esperanto – La Ratkaptista Bando
Esperanto-Gruppe Hameln

# RATKAPTISTA KURIERO

INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 60 OKTOBRO 2017

Kontakt: Heinz W. Sprick hameln@esperanto.de
www.esperanto.de/hameln Tel:0162/7536396

## Termine 2017+2018 mittwochs 19.00-21.00 Uhr

**Sumpfblume Hameln**

**2017: 8. Nov., 22. Nov., 29. Nov., 13. Dez.,** Weihnachtspause, **2018: 10. Jan., 24. Jan., 14. Feb., 28. Feb., 14. Mrz., 28. Mrz., 11. Apr., 25. Apr., 9. Mai, 23. Mai, 30. Mai, 13. Jun., 27. Jun.,** Sommerpause, **8. Aug., 22. Aug., 29. Aug., 12. Sep., 26. Sep., 10. Okt., 24. Okt., 31. Okt., 14. Nov., 28. Nov., 12. Dez.,** Weihnachtspause

*Das aktuelle Programm unter: www.esperanto.de/hameln*

**8. Dez. Weihnachtsfeier im Pfannekuchen**

**Paŭzo!** Motoro kiu senĉese laboras, trovarmiĝas post certa tempo. La lubrika oleo forvaporiĝas aŭ kemie disfalas, la mekanikaj partoj komencas frotadi kaj difektiĝi. Ni homoj ne estas maŝinoj aŭ robotoj, do ni despli bezonas paŭzon de tempo al tempo!
Kiom pezas glaso kun akvo? Ne tiom multe, ĉu? Sed imagu ke vi tenas ĝin kun etendita brako. Post kelkaj horoj, la glaso sentiĝas peza! Ĉu vi sukcesos teni ĝin dum tuta tago? Supozeble ne, almenaŭ ne sen doloro poste! Estas same pri streso. Ni povas travivi iom da streso, sed ne konstantan streson. Necesas de tempo al tempo formeti tiun glason por povi daŭrigi poste.
Bone zorgu pri vi mem. Ne atendu ke aliaj faru tion, ĉar ili ja ne povas scii kiel vi sentas vin. Kaj se iu jes scias, fidu tiun personon kaj aŭskultu lin/ŝin!




http://www.movado-sen-nomo.net/

# <u>Invito al la</u>

# <u>14-a "Rata★Rendevuo" en Hameleno</u>
# <u>la 25-an+26-an de novembro 2017</u>
# <u>Jubileo 30 jaroj „La Ratkaptista Bando“</u>

**<u>La „Ratkaptista Bando“ invitas vin al Hameln.</u>** Ni ŝatas festi kun multaj Esperanto-amikoj kaj gastoj nian jubileon kaj esperas, ke ni kune povos ĝui du belajn tagojn.
**<u>Loko:</u>** Kultur- und Kommunikationszentrum **<u>Sumpfblume</u>**, Am Stockhof 2a, 31785 Hameln. Senkosta parkejo en la korto de la Sumpfblume (dekstre de la domo) aŭ maldekstre apude sur la publika parkejo por 2,- € tage. Piede de la stacidomo al la Sumpfblume: 1,2 km, ĉ. 15 min. Nia telefono por la aliĝo kaj demandoj: **0162/7536396**.







*1-a MaSaKRo 1988 – 1-a Rata Rendevuo 2004 – 13-a Rata Rendevuo 2016*

**<u>La programo sabaton:</u>**
**- ekde la 10-a:** Renkontiĝo en la Sumpfblume, kaftrinkado kaj matenmanĝo eblas https://sumpfblume.de/
**- 10-a 30:** Oficiala bonvenigo kaj mallonga alparolado okaze de la jubileo
**- 11-a-12-a 30 (A):** Jarĉefkunveno de la landa ligo Malsupra Saksio EMAS
**- 11-a-12-a 30 (B):** Ĉiĉeronado tra la urbo 1 kun Renate Schulte „Hameleno – Kulminoj de tre aparta urbo“. Ĉe tiu ĉi inform-gaja ĉiĉeronado ni malkovras trezorojn, kiujn ni alikaze preterpasus; belegajn komercistajn domojn faros neforgeseblaj al ni taŭgaj proverboj; vi povos senti la veran vivon tiutempe en la malgrandaj stratetoj per babiladoj pri „tre specialaj“ „Hamelner – Hamelenser – Hamelunken“. Komencoe ĉe la Sumpfblume, fino ĉe la Rattenfängerhaus. (maks. 20 personoj, 2-a ĉiĉeronado je la 13-a 45.)
**- 12-a 30/12-a 45-ĉ. 13-a 30:** Komuna tagmanĝo en la Sumpfblume, bonvolu nepre antaŭmendi la manĝaĵon (rigardu la aliĝilon)
**- 13-a 45-15-a 15 (A):** Ĉiĉeronado tra la urbo 2 kun Renate Schulte, 2-a grupo
**- 13-a 45-15-a (B):** Renkontiĝo antaŭ la Münster-preĝejo (dorsa flanko) kun klarigoj pri la nova Eskap-Ĉambro en la kelo de la Münster-preĝejo (en la ĉambro: 14-a-15-a). Kiu kuraĝas lasi transmeti sin reen en la tempon de la jaro 1284 kaj sukcesos solvi ĉiujn enigmojn en la malnova alĥemiista kelo ene de unu horo? Nur helpos bona grupa agado. http://escape-and-more.de/ (pro maks. 5 personoj, 2-a kaj 3-a ebleco dimanĉon)
**- 14-a-15-a (C):** Prelego 1: Wiktoria Mronga: „La orientfrisaj insuloj“
**- 15-a 15-16-a 15:** Prelego 2: Heinz W. Sprick: „Vojaĝo tra Israelo kaj Jordanio“
**- 16-a 30-17-a 45: Publika legado:** D-ro Thorsten Sueße legas el sia 3-a krimromano „Schöne Frau, tote Frau“, (Bela virino, morta virino), kiu ludas en la regiono Hanovro, kaj en






kiu ankaŭ Esperanto ludas rolon. Enirprezo por eksteraj gastoj: 5,- €, poste estas ebleco aĉeti librojn de la aŭtoro (la librovendejo Matthias estos surloke).

**- poste:** libera tempo por vespermanĝi en la Sumpfblume aŭ apudaj restoracioj, aŭ rigardi en la urbocentro la dometojn de la kristnaska foiro, kiu komenciĝos du tagojn poste.

**- 19-a 30 - ĉ. 22-a 30: Publika koncerto kun Kajto-kvarope kaj Jonny M.**

Kajto el Nederlando jam antaŭ 10 jaroj dum la Rata Rendevuo en la preĝejo en Fuhlen entuziasmigis nin per sia folklora muziko kaj ankaŭ nun same kiel nia grupo festas sian 30-jariĝon. Pro tio la bando ĉi-jare nun denove prezentas sin en sia origina formo: kvarope. La juna regea muzikisto Jonny M el Kolonjo jam pasintjare en Indonezio kaj nun ĵus en Togolando entuziasmigis la aŭskultanojn kaj per sia ritmoj dancigis ilin. Ni lasu surprizigi nin kaj esti sorĉitaj de la muziko de ambaŭ grupoj! Enirprezo por eksteraj gastoj: 10,- €.





**<u>La programo dimanĉon:</u>**

**9-a 45-11-a (A):** Renkontiĝo antaŭ la Münster-preĝejo (dorsa flanko) kun klarigoj pri la nova Eskap-Ĉambro (2-a grupo)

**10-a -11-a (B):** Prelego 3: Bernard-Régis Larue: „Usonaj safarioj“

**11-a 15-12-a 30 (A):** Renkontiĝo antaŭ la Münster-preĝejo (dorsa flanko) kun klarigoj pri la nova Eskap-Ĉambro (3-a grupo)

**11-a 15-12-a 45 (B):** Kurseto: Frank Lappe: „Unua Helpo/Sukurado“

**13-a - ĉ. 14-a:** Fino de la renkontiĝo dum komuna tagmanĝo en la najbara ĉina restoracio „Shangri La“/Rattenfängerhalle (manĝo laŭ menukarto) https://www.facebook.com/Shangri-La-Hameln-1630638773930086/

(sen garantio, ŝanĝoj en la programo ankoraŭ eblas; prelegoj kaj koncerto estos en Esperanto; Ĉiĉeronado, Eskap-Ĉambro kaj legado estos en la germana, se necesas ni klopodos traduki)

<u>**Kostoj**</u>: Renkontiĝo kun ĉiĉeronado, legado kaj koncerto: **16,00 €**; Eksterlandaj gastoj: 11,00 €

Eskap-Ĉambro: aldone po persono: donaco al la Evangelia Junularo de la Müster-paroĥo: **18,00 €**

Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj (Sumpfblume, Shangri La) ĉiu pagas mem. Partoprenantoj, kiuj nur partoprenas la EMAS-jarĉefkunvenon ne pagas kotizon.

<u>**Aliĝo:**</u> bonvole nepre **ĝis la 12-a de novembro al**: hameln@esperanto.de , telefono: 0162 7536396 , aŭ:

Esperanto-Gruppe Hameln „La Ratkaptista Bando“, Schmiedeecke 2, 31840 Hessisch Oldendorf

**Bonvolu ĝiri la kotizon de 16,00 €** (+ eble 18,00 € por la Eskap-Ĉambro, + eble la prezon por la antaŭmendita tagmanĝo sabaton en la Sumpfblume) **ĝis la 20-a de novembro 2017** sur la konton de la Esperanto-grupo Hameln ĉe la ŝparkaso: Sparkasse Hameln-Weserbergland:

IBAN: DE87 2545 0110 0160 1186 18 BIC: NOLADE21SWB

✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂✂

**Aliĝilo: Mi partoprenos jenajn programerojn:**

O EMAS-jarĉefkunveno (sa. 11-a) I
O Ĉiĉeronado 1 (sa. 11-a) I O Ĉiĉeronado 2 (sa. 13-a 45) I
O Eskap-Ĉambro 1 (sa. 13-a 45) I O Eskap-Ĉambro 2 (di. 9-a 45) I O Eskap-Ĉambro 3 (di. 11-a 15) I
O Publika Legado kun Thorsten Sueße (sa. 16-a 30) I O Publika koncerto kun Kajto kaj Jonny M (sa. 19.30) I
O Tagmanĝo Sumpfblume (sa. 12-a 40) I O Tagmanĝo Shangri La (di. 13-a)
Mi mendas por tagmanĝi sabaton en la Sumpfblume jenan menuon:
O Rostita nudelaĵo vegana 7,50 €
O Rostita nudelaĵo kun kokaĵo 8,50 €
O Terpom-porea supo vegana 5,00 €
O Terpom-porea supo kun kolbaseto 6,50 €
O Deserto: Ĉokolada kremaĵo 4,00 €
O Deserto: Frukta salato 4,00 €
O La kotizon de .......... eŭroj mi ĝiros ĝis la .......................
O Kiu ŝatas: aldone mi donacos sumon de ............. eŭroj por kovri la kostojn kaj por tio mi deziras havi donac-kvitancon: O Jes I O Ne

## Esperanto-Veranstaltungskalender: siehe auch: http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm

2017: 3.-5.11. Kultura Semajnfino en Homburg; **10.-12.11. Esp.-Wochenendkurse in Sundern am Sorpesee;** 10.-12.11. GRUPE 21 en Gliwice, PL; 25.11. Zamenhoffesto en Berlino, **25.-26.11. 14-a Rata Rendevuo en Hameln,** 8.-10.12. 80a Studsesio kaj Zamenhof-festo in Herzberg am Harz;15.-17.12. 18-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Białisztok, PL; **26.12.-2.1.2018 JES Junulara Esp.-Semajno en Szczecin, PL; 27.12.-3.1.2018 16-a NR Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken; 27.12.-3.1.2018 Luminesk' en Haltern am See;** 2018: 11.-17.2. 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto TAKE en Havano, Kubo; 24.2.-3.3. MES Mediteranea Esp.-Semajno en Saint Raphaeo, FR; 2-4.2.-3.3. 25-a E-Korusa Staĝo ĉe Pireneoj, FR; 26.2.-8.3. 3-a Speciala Ekskurso en Kathmanduo, Nepalo; 7.-11.3. Bibliaj Tagoj en Mainz; 2-a Trilanda Kongreso en Bekasi, Indonezio; **30.3.-6.4. 34-a PSI Printempo Semajno Internacia en Plaŭen/Saksio;** 30.3.-6.4. 11-a Mezorienta Kunveno en Marakeŝ, Maroko; 13.-17.4. Brita kaj Tutkelta Kongresoj en Aberystwyth, Kimrio, Britio; 26.-28.4. 19-a Israela Kongreso en Akko, I-sraelo; 1.-6.5. Mirinda Lviv, Ukrainio; **9.-13.5. BARO Berlina Arbara Renkontiĝo en Hameln;** 10.-13.5. Skandinava Kongreso sur marŝipo, Danio-Norvegio; **18.-21.5. GEK 95-a Germana Esp.-Kongreso en Zweibrücken;** 19.-21.5. Eŭropa Festivalo de Espe-rantaj Kantoj en Wroclaw, PL; 30.5.-8.6. Roskilde Festivalo, DK; 31.5.-3.6. 53-a Brazila Kongreso de Esp. en Kuritibo, BR; 3.-12.7. NASK en Raleigh, US; **14.-22.7. SES So-mera Esp.-Studado en Slovakio;** 21.-28.7. 51-a Kongreso de ILEI (instruistoj) en Ma-drido, ES; **28.7.-4.8. 103-a UK Universala Kongreso de Esp. En Lisbono PT;** 1.-11.8. Milan Zvara piedmarŝo en Karparta Monta-ro, Ukrainio; **4.-11.8. IJK Internacia Junulara Kongreso en Ba-dajoz, ES;** 5.-12.8. SAT-Kongreso en Kragujevac, Serbio; 6.-13.8. 22-a Ekumena Esp.-Kongreso en Poděbrady, Ĉeĥio; 18.-25.8. 85-a Itala Esp.-Kongreso en San Marino;

INTERNACIA KALENDARO